

Por marki la 150-an datrevenon de la naskiĝo
de Johann Martin Schleyer
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 477, 1981.05.07 & 09

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Kiam oni interesiĝas pri la nuno kaj eĉ pri la estonteco, oni nepre devas rigardi al la pasinteco. Tial historiaj studoj tiom gravas. Kaj tio ankaŭ koncernas Esperanton. Fakte la historio de Esperanto ne nur limiĝas al la zamenhofa lingvo mem, pli kaj pli oni konscias, ke ĝi ankaŭ enbrakas la historion de la aliaj planlingvoj, kaj inter ili tre gravas la lingvo Volapük de Johann Martin Schleyer.

A.- Inter 1979 kaj 1982 prezentiĝas pluraj okazoj por memori pri la unua funkciinta planlingvo Volapük kaj pri ties aŭtoro Johann Martin Schleyer. Kaj ĝuste ĉijare indas iel marki la 150-an datrevenon de la naskiĝo de tiu planlingvisto, kiu naskiĝis la 18-an de julio 1831 en Oberlauda apud Bad Mergentheim en la lando Badeno, nuntempe en Germanio Federacia. Reinhard Hauptenthal pretigis por la Monata Cirkulero de Kultura Centro Esperantista tre interesan studon pri Johann Martin Schleyer, kaj kun lia permeso ni prezentos al vi dum serio da prelegoj parton de tiu ĉi historia raporto. Skribante al Svisa Radio Internacia vi povas peti ekzempleron de la cirkulero, kie aperos la kompleta artikolo, kaj ni faros la neceson por havigi ĝin al vi.

Cl.— Jen do ni citas Reinhard Hauptenthal:

A.- "Same kiel oni datumis la ekeston de Esperanto per tiu memorinda 15-a de decembro 1978, kiam la abituriento Zamenhof' pretekstis sian naskiĝ-tagon por festi, kun kelkaj lernejoj kamaradoj, la naskiĝon de sia unua pra-Esperanto, oni fiksas kiel genezon de Volapük lundon, 31-an de marto 1879. Kion Schleyer, ok jarojn poste, atribuis legendofare al

Cl.- "por mi mem enigma, eĉ mistera nokto sendorma",

A.- "tion li kronikis en sia taglibro tute senpatose jene:

Cl.- "Hodiaŭ mi ekskizis mian mondlingvon kaj gramatikon (simpla, racia, praktika)."

A.- "La rolon de naciaj festotagoj en la vivo de la ŝtatoj de nun transprenis en la Volapüka movado la 31a de Marto. Nelonge poste, en Majo 1897% Schleyer publikigis en **Sionsharfe** (Monataj folioj por katolika poezio), revuo kiun li fondis en 1875 kaj kies redaktoro li restis ĝis 1884, ian « Skizon de Mondlingvo kaj Monda Gramatiko por la kleruloj de ĉiuj popoloj de la tero ».

Cl.- "Tra ĉi vojo Volapük komencas trovi atenton kaj adeptojn antaŭ ol Schleyer, en printempo 1888, publikigis, ĉe Tappen en Sigmaringen, sian unuan lernolibron.

A.- "Cent jarojn poste, la jarkolektoj 1875-1879 de **Sionsharfe** ne plu troveblas en bibliotekoj de Germanioj federacia aŭ demokrata, de Aŭstrio aŭ Svislando, kaj la unua lernolibro de Schleyer iĝis bibliofila raraĵo. Faksimila reeldono, aperonta ĉijare ĉe Olms en Hildesheim, igos ĝin denove alirebla por planlingvistoj kaj kolektantoj.

Cl.- "Volapük, la vivoverko de Schleyer, falis en forgeson dum la vivo de sia aŭtoro kaj iĝis legenda.

A.- "Ĉijare, fine, oni memoras la 150-an datrevenon de la naskiĝo de Johann Martin Schleyer. Tiukaze la Martin-Schleyer-Gimnazio en lia naskig-urbo Lauda aranĝos solenaĵon je la 17-a de oktobro 1981.

Cl.- "Jam en pli frua tempo la naskiĝa urbeto Oberlauda, Litzelstetten (la naskiĝ-loko de Volapük) kaj Konstanz honoris la eltrovinton de Volapük per transdono de lia nomo al unu el la komunumaj stratoj (en Litzelstetten eĉ la ĉefa).

A.- "Memor-tabuloj fiksiĝis ĉe lia naskiĝ-domo, la pastra domo de Litzelstetten kaj lia longjara domicilo Schottenstrasse 37 en Konstanz, kie ankoraŭ, preskaŭ 100-jara, vivas unu el liaj mastrumantinoj, Aloisia Billinger.

Cl.- "Kiu do estis Johann Martin Schleyer?"

A.- "Schleyer naskiĝis la 18-an de julio 1831 en Oberlauda apud Mergentheim (Badeno). Lia onklo, Franz Martin Schleyer, igis lin studi, kontraŭ la origina intenco de la gepatroj. Li pasigis sian lernejan tempon en Königheim, Tauberbischofsheim kaj Karlsruhe.

Cl.- "Feliĉe konserviĝis atesto de Schleyer de la Grandduka Liceo Karlsruhe de la 2-a de julio 1852, kiu montras bonajn rezultojn en jenaj lernobjektoj: religio, latinaj aŭtoroj, latinaj stil-ekzercoj, grekaj aŭtoroj, historio, retoriko, filozofio, matematiko kaj fiziko, franca lingvo kaj en hebrea lingvo la noton "plej ofte bona". Lian diligenton kaj konduton oni juĝis "bona" kaj rangigis lin kiel trian el 17 lernantoj»

A.- "Poste sekvis studoj en Freiburg, kie, apud la teologio, li jam okupis sin pri poezio, muziko kaj lingvoj. Siajn poeziajn laborojn li poste daŭrigis dum multaj jaroj ĝis la momento, kiam, komence de la 80-aj jaroj, la mondlingvaj laboroj akiris prioritaton.

Cl.- "En aŭgusto 1856 Schleyer ordiniĝis kiel pastro, kaj komenciĝis jaroj de migrado kaj lernado, kiuj aktivigos lin en multaj paroĥoj, unue en Sinzheim, poste en Baden-Baden, de kie li venas al Kronatt apud Bruchsal, kie li komencas sian psalm-verkadon. Sekvas malfacilaj jaroj en Wertheim, kie, apud la pastrado en lernejoj kaj paroĥaj filioj, Schleyer faras religian instruadon, Tie li daŭrigas lingvajn studojn.

A.- En vintro 1862 Schleyer venas al Messkirch, kie li aktivas dum kvin jaroj. Je la 22-a de januaro 1863 li komencas verkadon de taglibro kiun li daŭrigas seninterrompe ĝis kelkaj tagoj antaŭ la morto. Ankaŭ en 1863 aperas liaj unuaj presitaj verkoj.

Cl.- En 1867 Schleyer ricevas sian unuan paroĥon en Krumbach, Reveninte en printempo 1875 de vojaĝo al Italujo (kun akcepto ĉe papo Pio la naŭa, Schleyer, pro eldiro en prediko (estas la tempo de Kulturkampf) venas en plej grandan embarason, kiu alportos al li kvarmonatan areston en la fortreso de Rastatt.

A.- Liberiĝinte Schleyer translokiĝis, en decembro 1875, al Litzelstetten, kie por li komenciĝas pli bona tempo. Tie apud la pastra laboro restas libera tempo sufiĉa por daŭrigi studadon de lingvoj, por la redakto de Sionsharfe kaj la ellaboro de la **mondalfabeto** rigardebla kiel la antaŭŝtupo al **Volapük**.

C1.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude kaj Andrée Gacond komencis prezentadon pri la neordinara vivo de Johann Martin Schleyer, la aŭtoro de la planlingvo Volapük. Ĝis reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), aŭgusto 2012*